

Honore al Kabe : Kabe centjara laŭ artikolo en *Esperanto* de UEA
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 455, 1972.06.28 & 07.01

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

En la monato junio la revuo *Esperanto* de UEA aperigis interesan kaj bone dokumentitan artikolon de Kálmán Kalocsay pri Kazimierz Bein, kiun la esperantistoj konas sub la pseŭdonomo **Kabe**. Ni konsilas al vi la legadon de tiu artikolo titolita *Kabe centjara*.

A.- Ankaŭ ni deziras honori tiun eksterordinaran esperantiston okaze de lia centjara jubileo.

Cl.- Fakte Kabe partoprenis la esperanto-vivon dum nur 7 jaroj. Sed tiu partopreno estis tiel vigla, fruktiga, ke ĝi lasis neforgeseblan eĥon.

A.- Kazimierz Bein konatiĝis kun esperanto jam en 1887, kiam aperis la *Unua Libro*. Tiam li estis 15-jaraĝa studento, kiu interesiĝis pri ĉio nova. Sed baldaŭ poste li estis ekzilita el Pollando, ĉar li estis membro de kontraŭcarisma movado. Pro tio nur en 1899 li finis siajn medicinajn studojn trapasante ekzamenojn en la Universitato Kazan. Tiam li estis 27-jaraĝa.

Cl.- Li famiĝis en la medicina fako, ĉar li verkis multajn librojn kaj artikolojn pri okulmalsanoj. Li fondis kaj prezidis la Varsovian Instituton pri Okulmalsanoj.

A.- En 1903 Kazimierz Bein refoje konatiĝis kun esperanto. Tiam li komencis dediĉi multe da tempo al tiu nova lingvo, ĉiutage po 3 ĝis 4 laborhoroj. Pro tio lia esperanto-kariero estis fulmrapida.

Cl.- Jam en 1904 aperis lia unua traduko : *Fundo de l' Mizero* de la pola verkisto Sieroszewski. Legante tiun teruran priskribon de la mizera vivo de la lepruloj en Siberio, la esperantistoj konatiĝis kun stilo multe pli matura, ol la kutime uzata stilo renkontata en la tiamaj gazetoj kaj libretoj.

A.- La aŭtoro de tiu romano *Fundo de l' Mizero*, Waclaw Sieroszewski, estas pola patrioto, kiu naskiĝis en 1858, do 14 jarojn antaŭ Kabe. Trifoje li estis ekzilita pro sia kontraŭcarismo. El lia unua ekzilo la pola literaturo riĉiĝis je epokfara etnografia studo, kies titolo estas *12 jaroj en la lando de la Ĵakutoj*. Ĝuste pri la moroj de la Ĵakutoj parolas la libro *Fundo de l' Mizero*, kiun tradukis Kabe, kun la permeso de la aŭtoro, kiun li verŝajne bone konis kaj multe admiris.

Cl.- Ekde tiu jaro 1904 senhalte aperis novaj verkoj : tradukoj aŭ lernolibroj, kaj fine vortaro. Jen iliaj titoloj :

A.- *Fabeloj* de Grim, *Noveloj* de Reymont, Orzesko, Konopicna, Ĉirikov. *Unua Legolibro*, *Internacia Krestomatio*, *Versaĵoj en Prozo*, *Patroj kaj Filoj* de Turgenev, kaj fine *La Faraono* de Prus.

Cl.- Tiu lasta romano, 680-paĝa libro, faris veran sensacion. Dank'al ĝi Kabe ricevis la titolon: « *Unua stilisto esperantista*. »

A.- Maloftaĵo en la esperanto-literaturo, tiu dika romano estis plurfoje reeldonita, tio en 1913, 1925 kaj fine 1957. Koncerne tiun lastan reeldonon, Kálmán Kalocsay skribas en la revuo *Esperanto*, kiun ni menciis :

Cl.- « *Kiam en 1957 aperis noveldone **La Faraono**, Kabe foliumis la libron ĝoje kaj kortuŝite. Eble li konjektis, ke ĝi, pli ol kio ajn alia, kion li faris, gardos lian memoron.* »

A.- El la sama artikolo ni citu, kion Kalocsay diras pri la stilo de Kabe :

Cl.- « *Kio distingas lian stilon tiel honorigitan ? La agrabla travidebleco, plena internacieco, perfekta regado de la « lingvo-spirito », manko de lingvaj implikaĵoj, trologikaĵoj, pedantaĵoj, evito de nedigesteblaj naciaj idiotismoj, tamen konservo de esprimpovo kaj nuancricio. Lian vorto-trovemon laŭdas, ke el la 33 novaj vortoj, kiun Stojan kalkulis en la Prus-romano, nur tri mortis.* »

A.- Fine en 1910 aperis verko titolita *Vortaro de Esperanto*, en kiu Kabe difinis la vortojn precize, sed en facila, kvazaŭ familiare simpla lingvo.

Cl.- Jam en 1906 Kabe estis elektita vicprezidanto de la Esperanto-Akademio.

A.- Sed subite, en 1911, la esperantistoj, kiuj fine havis la impreson esti renkontintaj veran verkiston, aŭdis, ke Kabe forlasis la esperanto-movadon. Kaj tiu forlaso estis definitiva. Neniam Kabe respondis al la invitoj, kiujn li ricevis de la esperantistoj, por partopreno en kongreso, eĉ en 1927, kiam tiu kongreso okazis en lia urbo Varsovio.

Cl.- En la sama periodo multaj esperantistoj dizertis la esperanto-movadon, sed iliajn nomojn oni rapide forgesis. Tiun de Kabe oni ne forgesis. Dudek jarojn poste en 1931 Kálmán Kalocsay verkis pri Kabe riproĉan rondelon en la libreto *Rimportretoj* :

A.- Jen tiu rimportreto numero 27-a :

Cl.- *Ho, Kabe, Kabe, Kabe, Kabe
Droninta vive en la morto,
Kia mister-malica forto
Vin povis de ni preni rabe ?*

*Ni lernis de vi lernant-knabe
Kui en la stil-retorto,
Ho, Kabe, Kabe, Kabe, Kabe
Droninta vive en la morto !*

*Kaj nun ni miras gape, strabe
Pri via karier-aborto.
Al vi la Esperanta vorto
Nun eble sonas jam arabe...*

Ho, Kabe, Kabe, Kabe, Kabe!

A.- En la esperanto-literaturo la nomo **Kabe** ekformis verban radikon, kiun registras *Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto* tiel :

Cl.- « **Kabe**/i. Fari kiel Kabe (pseŭdonimo de K. Bein), kiu, estinte tre vigla esperantisto, subite kaj tute forlasis la movadon.

A.- Ni esperas, ke neniuj el vi, karaj geaŭdantoj, kabeos.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), julio 2012*